

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3/2009



Grupo de esperantistoj kolektiĝis en Vatikanon pro la paskaj salutoj. Artikolo pri okazintaĵoj en Italio kaj la neokazintaĵoj de IJF sur p. 5.

Aŭtunaj Tagoj en Pori ♦ Syyspäivät, s. 18

Francoj konferencis, p. 9 ♦ La sorto de sameoj, p. 11

EU-baloto kaj Esperanto, p. 4 ♦ Pli da komercaĵoj, p. 26, 28

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhintaa/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Paula Niinikorpi, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Arvo Karvinen, Piikintie 22 as 10, 00680 Helsinki. ☎ 040 502 3765 ✉ arvo.karvinen@elisanet.fi

Jukka Laaksonen, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaletto@kolumbus.fi

Vilorg Teräväinen, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avooinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>





Ni fosas nian sulkon

Inter la kantoj verkitaj de Hjalmar Nortamo (1860–1931), la unua finnlingva verkisto

elektinta dialekton anstataŭ (kaj ne konkurence kun!) la ”skriblingvo”, unu el la plej popularaj estas ”Palokundlaiste veis”, Kanto de la Fajrobrigadanoj, verkita por somera festo de la volontula fajrobrigado de Raŭmo antaŭ jarcento. Kantoj de Nortamo estis eldonitaj de Literatura Societo de Satakunta (kiun li en 1919 en Pori fondis) sub la titolo ”Laulajapoika”, La Kantemulo, en 1933, sed ties kvardek kantoj ne estas kompleta kolekto. Inter komponistoj ni trovas inter aliaj Aksel Törnudd, Altti Palmgren, Ernst Borenius, Sulho Ranta k.a., kaj ankaŭ Nortamo mem, kiu donis melodion ankaŭ al la fajrobrigadanoj.

Mia redono de la Raŭm-dialekta humura kanto estas traduko tre libera, kiel rimarkas konanto de la originalo. La okazaĵoj estas samaj, lok- kaj personnomoj modifitaj. La bravuloj de la fajrobrigado pli viglas agi ol pripensi (”ei mef fundeerans stää nämä poja ja mnää”) kiam venas alarmo, averta aŭ ideo (mutt se Nuurber ol miäs ko se ilmottat tiäs et Turun gaupung ol palamaisillas – la nomo ŝanĝita nur pro rimo).

En soci-kulturaj movadoj kiel la nia necesas viglo kaj entuziasmo samkiel sobra realisma prikonsidero. Ekvilibrone inter tiuj du flankoj donas severa kritiko kaj memkritiko samkiel gaja kaj sana rido inter kaj pri ni mem.

Tuomo Grundström

Hjalmar Nortamo:
Nia brava fajrobrigado
(Palokundlaiste veis)

*Nia fajrobrigad' kiel al la parad'
iras al brulinfero plej ŝtorma.*

*Unu nur restas sen nia estingo, jen
estas ĝi: La soifo enorma.*


*Estis brava najbar' Ludoviko Lazar',
li informis, ke en Tampere
regas granda panik': Ĉiu dom' kaj fabrik'
proksimiĝas al la flampereo.*

*Ni tuj pretis al task', kaj kun botoj, gasmask',
kasko, zono kaj dika mantelo
vestis nin, kaj l' ĉeval' kuris tropaŝe al
difinita kaj tre klara celo.*

*Sed tuj en Tampere' ni rimarkis ja, ke
ĉio staras en ordo enurbe.
Do ni kun eta hont' ripozetis ĉe l' pont',
poste ekreveturis vojkurbe.*

*La urbestro al ni diris: "Via geni'
troas por via grava laboro.
Fosu en via sulk', manĝu el propra bulk',
malutilas tro granda fervoro."*

EDE aspiras novan uzoskalon por Esperanto



Kiam ĉi tiu gazeto venos el presejo, ni jam scios la rezultojn de la EU-baloto. Skribante ĉi tiun kolumnon mi aŭskultas lastajn debatojn de la politikistoj kaj cerbumas pri tiuj. Ne tiom pri kiun kandidaton baloti, ĉar tio estis por mi klare jam dum longe, sed pri konkludi la ĝeneralan evoluon de la Eŭropa Unio, pri la efiko de tiu evoluo al mia vivo, kaj fine pri la eventuala rolo de Esperanto en tiu evoluo.

En Finnlando iĝas Esperanto apenaŭ menciata en la EU-balotaj debatoj, sed germanoj havas nun eblon baloti por esperantistaj kandidatoj. La asocio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE) fine sukcesis la taskon kolekti 4000 subtenajn subskribojn de balotrajtaj germanoj, kaj registriĝis por esti kandidata listo. La germanoj povas nun elekti sian favoraton el listo de dek EDE-kandidatoj.

Oni emas demandi, ĉu ne partopreno en politikaj balotoj konfrontas la neŭtralecon de Esperanto, kiun oni tiom ofte asertas kaj emfazas. Tamen, kiel prezidanto de EDE, Manuel Cebulla, en intervjuo de germana gazeto Esperanto aktuell emfazas, Esperanto ja neniam estis tute neŭtrala. Ĝi ja estas *por* aperteco, egaleco, paco, bunteco kaj solidareco, kaj *kontraŭ* netoleremoj kaj limigoj – tiuj estas ja politikaj celoj. Ni povas teni Esperanton ekster la disputo pri dekstrismo/livismo, sed por la esencaj politikaj celoj, kiujn Esperanto povas realigi, certe indas agi per ĉiuj aplikeblaj manieroj.

En la pasintaj jardekoj la politiko tutmonde tre koncentriĝis ĉirkaŭ akso pri dekstrismo kaj livismo. Esperanta mondo ne estis tute libera de tiu duparteco, la movado ja estis ankaŭ plimalpli disigita en laboristaj kaj burĝaj organizoj. Ĝenerale tamen ŝajnas al mi, ke oni emis teni la

Esperanto-movadon plejeble for el veraj politikaj disputoj. Verŝajne tio estis ankaŭ saĝa strategio en situacio, kie multaj emis pensi, ke kunlaboro kun unu flanko signifas preskaŭ bataldeklaron kontraŭ la alia flanko. La demando pri merkata ekonomio aŭ planekonomio ne estis grava por Esperanto, la lingvo ja same bone funkciis kun kiu ajn sistemo, kaj do Esperanta mondo vivis modeste, serĉante siajn viveblecojn en ambaŭ flankoj, kiom ajn limigitaj la kondiĉoj povis iam esti.

Nun, kiam la konkurso inter merkata ekonomio kaj planekonomio praktike jam finiĝis, oni povas konsideri la politikan sferon de nova perspektivo. Diversaj politikaj celoj aperas en tute aliaj aksoj ol tradicia dekstrisma/livisma, kaj tiuj celoj povas esti kongruaj aŭ malkongruaj kun Esperanto.

Eventuala enpaŝo de multaj esperantistoj en la Eŭropan Parlamenton povus oferti por Esperanto lanĉon fine atingi eĉ mondvaste tian vastan uzon, kion ĝi laŭ opinio de ni esperantistoj sendube meritus. La sola minaco estas, ke ligiteco kun EU povus por loĝantoj de aliaj mondpartoj tro emfazi la eŭropcentrecon de Esperanto, sed je tio mi ne tamen kredas. Esperanto estas ĉiukaze eŭropa inventaĵo, sed bonaj inventaĵoj trovas uzon ĉie. Ja ni eŭropanoj ne rifuzas uzi paperon pro tio, ke ĝi estas ĉina invento, komputilon pro tio, ke ĝi estas amerika invento, aŭ kafon pro tio, ke ĝi estas afrika invento.

Mikko Mäkitalo

Mia ekkoniĝo kun Esperanto

Ni longe atendis ĉi tiun vojaĝon. Fine nin antaŭis Italio kaj esperanta festivalo!

Venezia renkontis nin kun suno kaj bona humoro, kaj la italaj homoj kun sia temperamento tre diversa de la finna: ĉiu krias, haste agas, ridas kaj gestas kun manoj. Ili kuras kaj malfruas. Kaj kiam ili iras surstrate ili kantas. Ne nur kantetas sed kantas laŭte kaj iam eĉ dancas! Ili gestas eĉ kiam ili parolas telefone :=)

Nekredeble!!!! Ili povas paroli samtempe unu kun alia: farante demandojn, respondojn al tiuj, aŭskultante kaj komprenante la kunparolanton! En trajno el Venezia al Giulianova tri italoj okupis lokojn kaj do venis ankoraŭ tri kiuj havis biletojn por tiuj lokoj, sur kiuj la unuaj tri sidis. Do ĉiuj ses vojaĝantoj, kaj kelkaj aliaj, ĈIU SAMTEMPE, parolis, montris per manoj, klarigis siajn agojn, petis pardonon kaj ridetis! Mirinde ke ĉiuj en la situacio komprenis la aliajn, eksidis, silentis kaj – daŭris rideti unu al la alia!



Gondolistoĵ vokis inter aliaj por ne kolizii kun tiuj kiuj venos el alia kanalo. Finnoj estus inventintaj signalan mekanismon. Sonorilojn, spegulojn, aŭ ion tian... Sed tiuj estas ne por italoj!!! Ŝajnas al mi, ke eĉ se ĉiuj vidus per speguloj kaj uzus sonorilojn, ili tamen krius. Kaj nepre gestus! Alikaze ili sopirus kaj mortus pro enuo.

Kutime kiam mi venas al iu loko, mi tuj rigardas ĝin kaj pensas, ĉu mi volus tie loĝi, kaj se jes, kie precize. En Venezia mi ne volus. Kvankam tie estas multe da akvo kaj ne aŭtoj, sed nenio verdas! Nur ŝtono. Kaj ne suno, ĉar la stratoj estas mallarĝaj, kaj la suno ne povas atingi tien. Kaj tial estas tre humide. Kaj multe da homoj. Ne nur tial, ke turistoj promenas ĉie, sed ankaŭ tial, ke stratoj malmultas. Ĉie nur kanaloj. Tamen mi komprenas, kial caro Petro la unua impresiĝis pro la beleco de Venezia kaj decidis konstrui la urbon Peterburg samstile. Mi same estus volinta, sed volus la erarojn forigi.

Centra placo de San Marco – preĝejo (9a ĝis 15a jarcento), palaco de Doge (14a ĝis 16a jarcento), antikva biblioteko de San Marco (16a jarcento), domoj de religia frataro, monaĥejo. **IMPONEGE!** Eĉ post beleco de Peterburg tio imponegas. El beleco de Venezia oni ne volus foriri. Mi eĉ

El beleco de Venezia oni apenaŭ emas forveturi.



Arta muzeo de Giulianova.

forĝesis, ke min ĵus ĝenis la abundo de turistoj.

Sed malgraŭ kiom belis Venezia, vespere oni devis daŭrigi vojon al la festivalo, al Giulianova. La unua, kion ni vidis tie, estis palmoj, grandaj kaj multaj. Ni trovis la festivalejon facile, sed la festivalo estis nuligita. Pro tio, ke ni ekveturis jam kelkajn tagojn pli frue, ni ne ricevis sciigon pri tio. Pro tertremo en L'Aquila mortis ĉ. 300 homoj kaj multaj perdis hejmon, kaj senhejmuloj venis en nian festivalejon. Venis ok esperantistoj por partopreni la festivalon, el tiuj kvar



La festivalejo troveblis laŭ stratadreso facile, sed nin tuj mirigis, ke sur la pordoj estis nenia anonco pri la festivalo...

tuj forveturis, kaj surloke restis ni kvar: ni kaj du germanoj.

Kompreneble ni estis iom malgajaj pro la nuligo de festivalo, sed la organizantoj aranĝis por ni dormejon kaj manĝojn kaj post tio helpis nin feriumi kelkajn tagojn en Roma. La italaj amikoj organizis por ni dormejojn en Roma kaj proksime al ĝi.

En Giulianova ni vizitis artan muzeon, vidis mozaikojn, arkitekturon, statuojn. Tre bele. Ĉio floris kaj estis farita kun amo. Preskaŭ ĉio arto de italoj ligiĝas kun religio kaj katolikismo estas tre bela religio.

Post du noktoj en Giulianova ni veturis al Roma. Tre granda urbo, kun tri ĉefaj fervojaj stacioj. Kien ni alvenis, 29 platformoj. Ankaŭ en la enurbaj stacioj kelkaj platformoj en ĉiu. Kaj en la ĉefa metrostacio estas 14 platformoj. Tre malfacile trovi, kio ekveturas, kien, kiam.

Kvankam la trajno al Roma malfruis unu horon (en Italio la trafiko kutimas malfrui, sed homoj estas kutimiĝintaj pri tio kaj ne iritaci- as – kaj se oni planas veturon kun trajnŝanĝo, tio preskaŭ ne eblas), la kroman horon ni eĉ ne rimarkis, ĉar la tuta veturo okazis sur montaro, kiu estis tre bela kaj impona. Deklivoj, vilaĝoj, kasteloj, turoj, montaraj vojoj, kaj la aŭtoj sur ili – aspektis kiel ludiloj!

Kaj en Roma nature estis kultura ŝoko. Colosseo, ruinoj de la antikva Roma, triumfaj arkoj. Ĉio tute en la urbo, inter la vivo de la urbo.



Belaj montaraj pejzaĝoj en Italio abundas ĉie, kiel ĉi tiu vilaĝo Monterosso.

ĉe unu budo rezultis nur respondo de la vendisto: "Not possible. Very ice." Turistojn oni ne troe flatas en Italio, sed tio ne rompis nian bonan humoron. Post Italio ĉiukaze jam estis kvazaŭ eta hejmvieno veni al Aŭstrio kaj Germanio, kie la kutimoj kaj konven-

cioj jam multe pli similas Finnlandon. Dum la unua vespero ni iris en la urbomezon por rigardi. Tio estis tuj antaŭ la pasko kaj estis tre bele, kandeloj en la fenestroj de la Colosseo, aŭdeblis muziko. Kaj antaŭ la Colosseo homoj piediris kun kandeloj. Eĉ pli impone ol Venezia! Dum la pasko ĉiuj preĝejaj sonoriloj sonoris. Impone!

En Vatikano la papo salutis en multegaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto, kaj ni estis kun esperantista grupo kun ŝildoj de la literoj E-S-P-E-R-A-N-T-O kaj krie respondis, kiam venis la saluto en Esperanto.

Pri servoj de la italoj ni havis kelkajn malpli plezurajn spertojn. Ekzemple, ni aĉetis en restoracio picon "Pizza Giganti" kun salmoj, kaj ricevis iajn strangajn bakitajn panetojn kun pecoj da salmo sur ili. Aŭtomato de busbiletoj manĝis nian monon sen doni ian bileton, kaj neniu povis redoni la perditan monon. Provo por aĉeti glaciaĵon

La plej grava afero estas la homoj, ĉe kiuj ni tranoktis. Antaŭ la vojaĝo ni kontaktis per Pasporta Servo homojn, ĉe kiuj ni povis resti. Estas tre agrable, ke ĉie en la mondo estas ho-

ĉe unu budo rezultis nur respondo de la vendisto: "Not possible. Very ice." Turistojn oni ne troe flatas en Italio, sed tio ne rompis nian bonan humoron. Post Italio ĉiukaze jam estis kvazaŭ eta hejmvieno veni al Aŭstrio kaj Germanio, kie la kutimoj kaj konven-



La feliĉaj vojaĝantoj en antikva urboparto de Bergamo.

Vojaĝe


moj, kiuj pretas renkonti kaj akcepti esperantistojn el aliaj landoj. En Terni la familio, kie ni restis, eĉ organizis kunvenon de ilia loka esperantista studgrupo.

Estis plezura vojaĝo – kaj mia unua eksterlanda vojaĝo kun Esperanto – sed estis ankaŭ plezure post semajnoj lacaj reveni hejmen. Kaj nun, ripozintaj, ni jam planas la sekvan vojaĝon – novajn renkontojn kun Esperanto.

Olga Egorova

Linz neatendite bonvenigis nin per Esperanto-statuo tuj sur la korto de la trajnstacio...

...sed la Zamenhof-strato de la sama urbo estas desappointo: malbela kaj malsprita industria strato.



Unu el niaj ĉefaj planitaj celoj survoje estis la Esperanto-muzeo en Wien.

Salutojn el sudorienta Francio

De la 30a de aprilo ĝis la 3a de majo esperantistoj de la rodanalpa regiono (rivero Rhone-montaro Alpoj) kongresis en la urbo Moûtiers (loĝantaro 34000). Aliĝis al la kongreso ĉ. cent personoj, aldone venis kelkaj neesperantistoj ĉeesti unuopajn programerojn. La celo de la E-federacio estis varbi novajn interesatojn.

La programo komenciĝis per prelego (kun diapozitivoj) de R. Pyhälä pri la sorto de sameoj, kiun oni interpretis france. En la salono troviĝis ankaŭ trideko da neesperantistaj francoj. Sekvatage, la unuan de majo, okazis ekskursoj en la montaro, gvidata promenado en la urbo mem, ĉiuj interpretataj Esperante. La ekskursanoj estis dorlotataj de belega vetero, someraj floroj

kaj bonodoroj. Posttagmeze la esperantistoj de la regiono havis sian ĝeneralan asembleon. Poste prelegis Thierry Saladin, kuracisto, pri la temo "Eŭropa Unio kaj la lingvoj: mitoj kaj realaĵoj?" Aldone, la lokaj agemuloj okazigis muzikan spektaklon, kie ili ne nur korusse kantis sed ankaŭ gaje moviĝis. La kulmino de la festa tago estis la koncerto de "Duoble Unu": Fransuaz kaj Patrik prezentis kantojn el Mediteraneaj landoj.

En la 2a de majo ni renkontis ĉinajn samideanojn en video-debato. Rapide flugis salutoj, demandoj, respondoj, kantoj kaj desegnaĵoj inter la kontinentoj, kvazaŭ longa distanco ne ekzistus. Dume infanoj amuziĝis en lud-ateliero, ▷



Saliko antaŭ maljuna ginko-arbeĝo.

novuloj konatiĝis kun Esperanto, spertuloj konversaciis, iu ajn povis malkovri la eblojn uzi E-ton pere de komputilo, kantemuloj kantis, ekz. kantojn de A. Karkiainen.

Posttagmeze ni vidis lumbildojn pri Almaty, la plej granda urbo el centra Azio (Kazaĥio), fare de Daniel Biro, kiu kun sia familio tie pasigis sufiĉan tempon por konatiĝi kun la lando. Sekvis prelegoj de Maryvonne Robineau pri “La arto vojaĝi”, kaj de gesinjoroj Charriere pri biciklado tra Centra Azio, Ĉinio, Pakistano, Hindio, Nepalo kaj Sudorienta Azio. Nekredeble varie ili projekciis siajn interesajn bildarojn per komputilo sur ekranon. Nokte la kongresanoj dancis, kuraĝigataj kaj konsilataj de ensemblo Bal Folk.

Ĉiutage funkciis Libroservo. Fine de la kongreso okazis aŭkcio. La salonoj estis nomataj laŭ L.Zamenhof, G.Lagrange, C. Piron kaj laŭ du agemuloj de la Rodanalpa E-Federacio. Virinoj ornamis la enirhalon per freŝaj siringoj kaj aliaj floroj. La estraro de la urbo Moutiers regalis nin per ”aperitivo”, t.e. bufedo el mal-



Vidaĵo el la montaro super la urbo Moûtiers.

varmaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, ankaŭ kafo kun dolĉaj kuketoj. La vic-urbestrino salutis nin Esperante kaj france. Ĉu oni povus deziri ion plian? – Apenaŭ! vidu ankaŭ <http://rodanalpa.federacio.free.fr>

Saliko



M. Pyhälä, Renée Triolle, anino de la urbestro kaj vic-urbestrino de Moûtiers.

La sorto de la sameoj, indiĝenaj eŭropanoj

Resumo de la prelego de "Saliko" en Moûtiers, 30.4.2009

Sameojn oni nomas ankaŭ laponoj, sed ili mem preferas esti nomataj "sameoj", surbaze de sameaj lingvoj. De nememorebla tempo ili loĝas en nordaj Skandinavio, Finnlando kaj Kola-duoninsulo. Origine tie ne ekzistis ŝtataj limoj, kaj la sameoj en malgrandaj grupetoj nomade kaj laŭsezone migradis de loko al loko, laŭ siaj bezonoj kaj laŭ interfamiliaj konsentoj pri paŝtejoj kaj rajtoj ĉasi kaj fiŝkapti.

El la naŭ sameaj lingvoj jam du mortis, nur tri iom pli forte pluvivas. La plej granda parolantaro estas tiu de la nordsamea lingvo. La sameoj vivtenis sin per boacobredado, fiŝkaptado, kolektado de fungoj kaj beroj, ĉasado. La kulmino de la boacobredado okazis en la 18a jarcento.

La intereso de la sameoj kaj tiuj de pli sudaj loĝantoj de la Nordio estis kontraŭaj. La suduloj deziris politikan kaj ŝtatan stabilecon, lingvan kaj religian unuecon en ĉiu ŝtato. Al ili estis grava posedado de la tero kaj de akvaroj kiel fonto de riĉo. Ili deziris imposti, forhaki arbarojn, fondi bienojn, bredi bovinojn, serĉi ercojn, generi elektron per la forto de la riveroj, dum sameoj vivis nomade kaj en harmonio kun la naturo.

La 19a jarcento kaj la komenco de la 20a jarcento estis la plej duraj al sameoj. La subpremado realiĝis en iom malsamaj manieroj en la kvar ŝtatoj Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Rusio. (Finnlando estis parto de Svedio ĝis 1809, kaj parto de la Rusa Imperio 1809-1917). Ĉie la ŝtatoj uzis kaj lingvajn, rasismajn kaj terorabajn rimedojn.

En Norvegio la subpremado plej fortis. Ĝi konsistis el lingva kaj teroraba perforto, kiel ie

ajn kie vivas indiĝenaj triboj. Norvegoj volis tute norvegi la sameojn. Sameoj ne bezonis militservi, sed ili estis severe impostitaj, kelkloke eĉ de du ŝtatoj samjare, ĉar en la pasinto la ŝtataj limoj ne estis markitaj kaj firmaj. Oni ĉie konsideris la sameojn apenaŭ homoj, malpli dignaj je la rajtoj de la aliaj ŝtatoj. La unua formo de la norvega subpremado estis lingva. Paŝon post paŝo la ŝtato antaŭeniris al absoluta malpermeso uzi samean lingvon en lernejoj kaj en oficialaj kontaktoj, ĝis malpermesado uzi interpretistojn. Sameaj infanoj devis vizitadi lernejojn, kiuj kutime situis tiel fore de iliaj hejmoj, ke ili povis renkonti siajn familianojn nur dum somera kaj kristnaska libertempado. Alitempe ili devis loĝi en loĝejaro apud la lernejo, kie ili estis punataj, se ili uzis la gepatran lingvon. Tiel ili estis fremdigataj de siaj familio kaj gepatra vivmaniero. Ili ne lernis tion, kion ili bezonus en sia samea kulturo, sed ili adaptiĝis al la terkultivista kaj bovinbredista kulturo de pli sudaj teroj. Ofte ankaŭ la gepatroj ĉesis uzi la samean lingvon por sekurigi pli facilan futuron al siaj infanoj en la norvega socio.

Ne nur lingve Norvegio subpremis siajn sameojn. Sameoj ne rajtis aĉeti teron, se ili ne sufiĉe bone posedis norvegan lingvon. La vastaj teroj, kiujn sameoj antaŭe konsideris la siaj, estis konsiderataj kiel ŝtata posedaĵo. Estis farita leĝo, ke nur norvegoj rajtis setli tie. Krome, nenorvegoj ne rajtis posedi fiŝkaptilojn, nur helpi al norvegaj fiŝkaptistoj. Antaŭe sameoj kutimis fiŝkapti sur la bordo de la Arkta maro, sed tio fariĝis neebla.

En la 1980aj jaroj la konstruado de elektroproviza baraĵo en la rivero Alta ribelighis la sameojn kontraŭ la subpremado, sed ili perdis la batalon. Tio tamen atentighis la mondon pri ▷

ilia sorto, kaj ankaŭ pliigis ilian konscion pri sia propra vivmaniero kaj kulturo kaj pri parencaj grupoj aliloke en la Samea lando.

En Svedio la lingvopolitiko estis iom alia. Oni uzis katekiztojn, t.e. migrantajn instruistojn pri kristanismo, kiuj migris de unu boacobredista tendaro al alia. Ili instruis svede kaj ĉefe pri religio. La lernantoj povis loĝi ĉe siaj familioj, en sia propra tradicia kulturo. La oficiala pensmaniero estis tia: sameoj restu sameoj, sed tiuj kiuj ne bredas boacojn kaj ne vivas nomade, devas vizitadi ordinarajn svedajn lernejojn. Pri la posedo de la teroj ankaŭ en Svedio ĉiam estiĝis disputoj, konfliktoj. Sameoj ne devis militservi sed ili devis pagi impostojn liverante felojn kaj aliajn ĉasaĵojn kaj fiŝkaptaĵojn.

En la Rusa Imperio oni ne multe atentis pri sameoj, kiuj loĝis en Kola-duoninsulo, sed post la revolucio de 1917 la vivo aliiĝis. La loĝantaro de la duoninsulo kreskis en 10 jaroj de 20 mil al 150 mil pro novaj enmigrintoj. Boacobredado estis kolektivigata. En la 1940aj jaroj sameoj estis pelataj en kolĥozojn, kie ili ekvivis kun anoj de dekoj de aliaj popoloj kaj ekkutimiĝis al ties lingvoj, ekuzante la rusan. Stalin persekutis kaj malliberigis la plej riĉajn boacistojn, devigis ilin migri aliloken, malliberigis aŭ ekzekutis ilin. Dum generacioj la sameoj ensuĉis kun la patrina lakto timon, mankon de memfido, senton de malsupereco kaj nesekureco. Sovetunio konstruis elektroprovizajn barierojn en riveroj, kovrigis boacajn paŝtejojn kaj sameovilaĝojn per akvo por fari grandajn akvorezervejojn, fondis minejojn por akiri kupron kaj nikelon. Grandaj partoj de Kola-duoninsulo estis rezervataj nur por arma uzo; aliaj homoj rajtis tie nek loĝi nek viziti.

Dum militoj soldatoj – ĉu finnaj ĉu sovetaj – senkompatate buĉis boacojn por nutri sin. Kiam Finnlando perdis Peĉengon al Sovetio, la sameoj de tie estis evakuitaj en Finnlandon apud la sameojn de Inari. Tie oni ilin unue suspektis, evitis, ĉar ili estis ortodoksuloj, “rusoj”, ne pro-

testantoj kiel la lokaj sameoj. Iliaj vestaĵoj, muziko kaj kutimoj estis fremdaj, ne facile aprobataj. Nun nur 0,2% el la loĝantaro de Kola estas sameoj.

En Finnlando en la 1920aj kaj -30aj jaroj regis subprema politiko kaj la koncepto pri sameoj kiel malsupera ne-evoluinta raso. La subpremo koincidis kun la tuteŭropaj kolonizemaj ideoj. En la dua mondmilito sameoj devis militi, kun aliaj finnoj, kontraŭ Sovetunio kaj renkonti siajn parencojn de la Kola-duoninsulo kiel malamikojn. Ili apenaŭ komprenis, kio estas “nacio” kaj “ŝtato”, ĉar ili vivis nur kiel familioj en vastega sovaĝejo, kun longegaj distancoj inter la tendaroj. Konfronti la mondon kaj la homamasojn ekster la netuŝita naturo de la nordaj neloĝataj vastaĵoj estis al ili forta ŝoko.

En la 1940aj jaroj ĉio rapide sanĝiĝis. Post la fino de la milito la tuta loĝantaro de finnlanda Laponio estis evakuita pli suden, antaŭ ol komenciĝis la t.n. Laponia milito, kiu forpelis el norda Finnlando 200 mil germanajn soldatojn kaj detruis 80-90% el la nordaj vilaĝoj kaj urboj, lasante minojn en la tuta vastaĵo. La evakuitaj sameoj devis renkonti tute alian vivmanieron en pli suda Finnlando, kie ilia propra kulturo estis nekonata kaj neaprezata. La sudoj konsideris ilin malpuraj kaj stultaj. Trafis ilin malsanoj, kiujn ili ne antaŭe konis; difterio, kokluŝo, tifo. La klimato kaj la dieto de la sudo kaŭzis sanproblemojn. Kiam la evakuitoj reiris al siaj teroj, ili trovis ĉion rompita, ŝtelita, bruligita, kaj la nova komenco estis tre malfacila. La tradicia vivkoncepto de la sameoj estis rompita, ilia menso skuita.

En la 1950aj jaroj Finnlando ekkonstruis vojojn al kaj en Laponio. Norda Finnlando estis rekonstruata laŭ sudfinnaj modeloj. Terkultivado multloke anstataŭis boacobredadon. Idealoj kaj vestaĵoj finiĝis. La ŝtata maniero administri la aferojn anstataŭis sameajn tradiciojn. Nur unu ekzemplo: Ĝis la 1950aj jaroj sameoj en Utsjoki-komunumo uzis la samean lingvon en siaj

deputitaraj kunsidoj sed poste la finnan, kvankam la deputitaro plejparte estis daŭre samea.

Ankaŭ teknikaj ŝanĝoj draste efikis en Nordio: motorsledo, helikopteroj, komputiloj nun helpas paŝti la boacojn. Okazas katastrofoj, kia Ĉernobilo: pro la cesium en la likeno sameoj devis buĉi siajn boacojn kaj enterigi la viandon. Konstruiĝas skistacioj, hoteloj, kreskanta turismo. Malpliigis boacopaŝtejoj pro klimataj kaj forstadaĵaj kialoj. En samealingva novajfensendo televida estis dirate, ke post 50 jaroj restos nur 20% el la paŝtejoj de la sameoj. Kelkaj sameoj fariĝis ĉiĉeronoj por turistoj, ili gastigas turistojn, posedas restoracion kaj tranoktejon, laboras en skicentroj, aliaj fariĝis lertaj manlaboristoj, teksistoj, orajistoj, gravuristoj, multaj fariĝis terkultivistoj, bovinbredistoj. Granda nombro de sameoj translokiĝis en urbojn, eĉ en Usonon aŭ Kanadon. Se urbaj sameoj deziras gardi sian sameecon, ili devas klopodi por transdoni sian lingvon kaj kulturon al siaj infanoj. Estas pli facile tute finniĝi, svedigi, norvegiĝi, rusiĝi ktp, depende de la ŝtato.

Ne ĉio tamen estas malbona. Pro la novaj vojoj kaj pli moderna trafikado eblis funkciigi poŝton, policon, sanservojn, limgardadon. Pro modernaj komunikiloj la sameoj de la tuta Nordio iĝas konsciaj pri sameoj loĝantaj en aliaj landoj kaj pri siaj samsortanoj en aliaj kontinentoj. Naskiĝis kunlaboro por atingi gravajn celojn kaj plivalorigi sian sameecon. Estas fondataj asocioj por kultura kaj politika kunlaboro. Sameoj ekpostulas siajn rajtojn, fieras pri sia kulturo. Ili havas parlamenton, kie ili mem provas solvi la konfliktojn inter si kaj per kiu ili volas esti reprezentataj en ŝtataj, politikaj, kulturaj kaj juraj aferoj. Fondiĝis kulturaj centroj, muzeoj, festivaloj, kutimo internacie rekontiĝi kaj kunsidi, diskuti. En nordsamea lingvo aperis cifereca vortaro, komputilprogramoj por korekti ortografion, helpi en la gramatiko kaj vortfarado. Televide oni povas sekvi novaĵojn en samea lingvo, aperas ankaŭ gazetoj. Ekde la

Samea flago.



1970aj jaroj sameoj en Finnlando rajtas uzi sian lingvon ĉe oficialuloj, sed mankas interpretistoj, formularoj tradukitaj en la samean, instruistoj kaj pastoroj. La samea libromarkato estas tre limigata: homoj ne ĉiam havas monon por la libroj kaj la publikigado ne donas profiton. En nordfinnaj lernejoj kaj en la universitato de Oulu oni povas studi samean lingvon.

Sameoj desegnis kaj adoptis neŝtatan flagon kaj kanton por si, troveblaj komputile en Lingva Prismo. Ilia nacia tago estas la sesa de februaro. En la flago oni vidas duone ruĝan, duone bluan cirkon, kiu reprezentas la sunon kaj lunon. Sameoj ja kredas sin esti gefiloj de la suno, kaj ilia patrino estas la tero. Ili havas siajn artistojn en literaturo, muziko kaj pentroarto.

Nuntempe en la tuta mondo loĝas proksimume 300 milionoj da indiĝenoj en sepdeko da landoj, el kiuj sameoj estas nur ereto. Ekis kunlaborado kun aliaj aŭtoktonaj homgrupoj, precipe kun la indianoj de la Norda Ameriko, inuitoj (eskimoj), kaj la arktaj popoloj en norda Ruslando, Siberio. Tutmonda konsilio de indiĝenaj popoloj estis fondita en 1975, kaj nun la evoluinta internacia ŝtataro ne akceptas ŝtatojn, kiuj subpremas naciajn minoritatojn. La sorto de sameoj estas internacie kritikata. Oni agnoskas, ke sameoj – kiel ĉiuj indiĝenoj – havas la rajton mem priskribi kaj koni sian historion, sed pri la posedado de la tero kaj akvejoj daŭras disputoj kaj en la tuta Nordio, nun dispecigita inter la kvar ŝtatoj. Egalrajtecon kaj justecon oni pli facile proklamas principe ol realigas praktike.

Saliko

La kanto de la provinco Satakunta

*Agroj vastas sub la volbo
de l' ĉiela alt',
arboj staras en vicordo
trans la kampa rand'.
Jen popolo en trankvilo
fosas sulkon per plugilo
en la patra land'.*

*Tie ĉi en la pratempo
diligentis li,
kiu sciis sen timsento
pioniri pri
sorĉovorta ekkonkero
de l' naturo, kaj prospero
en hejmharmoni'.*

*Kiam malfeliĉ' agresas
kun kruel', minac',
ni labori ja ne ĉesas
kun elan', sen lac'.
Levas sin popol' senplende
urso-unge, sindefende;
restariĝos pac'.*

Identeco kaj unueco inter la provincoj de Finnlando estis grava faktoro en la formado de ŝtato kaj nacio antaŭ jarcento kaj pli. Identecon kreis literaturo, arto kaj muziko. En tiu periodo aperis kantoj dediĉitaj al provincoj kaj regionoj. En Satakunta la lokon de “La provinca himno” gajnis ĉi-suba. Ĝi estas unu el kvin konataj Satakunta-himnoj, sed la ceteraj restis malmulte konataj: 1897 en la unua provinca kantfesto de Kustaa Killinen, komponita de Oskar Merikanto; 1909 en la kantlibro de Valistus de Juho Laine, komp. J.V. Vainio; 1912 ankaŭ de Hjalmar Nortamo, komp. Toivo Kuula; 1939 gajnis konkurson en la kantfesto en Ulvila Eino Kivistö, komp. Eino Linnala.

La tri strofoj de Aino Voipio estas bona elekto por provinca himno. Ĝi bele priskribas trankvilan, konstantan, stabilan laboron sen pompo kaj patoso. Iel parenca al nia mondvasta esperanta provinco.

Poemo de Aino Voipio (1883–1975), instruistino en Huittinen. Verkita en 1912 por la 20-jara jubileo de Popola Altlernejo Okcident-Finnlanda, kies direktorino ŝi tiam estis. Origine kun ses strofoj, oficialigita en 1948 de Provinca Asocio kun strofoj 1,3 kaj 6. Esperante Tuomo Grundström.

Muziko de Axel Törnudd (1874–1923). Li estis lektoro pri muziko en la instruista seminario en Rauma. Komponis por violonĉelo kaj vira koruso, grave progresigis lernejan muzikpedagogikon kaj verkis lernolibrojn. Laŭ iuj informoj li vizitis la 14-an UK en Helsinko en 1922 kun grupo da seminarianoj, sed mi ne trovis konfirmon. Eble iu leganto scias ion?

(tg)

Agentoj agas amerike

La gazeto “USA Today” raportis 20.4., ke laŭ freŝaj informoj nur 13 procentoj el la laborantoj de CIA, la organizaĵo de la usona ŝtato por spionado kaj kontraŭspionado, scias iun fremdan lingvon. Tia estas la stato nun, preskaŭ sep jarojn post la teroragoj en Novjorko 11.9.2001. Post tio, laŭ sciigo de CIA mem, la nombro de lingvosciantoj kreskis je 70 procentoj. Se estas veraj nombroj, kaj se ni difinas 20000 kiel nombron de dungitoj (la sekreta servo nombron

mem ne indikas), ni povas kalkuli kiel (mal) multaj fakuloj sekvas la mondon tra lingvobaro en la grandpotenca spioninstitucio.

Plej mankas sciantoj de “kritike gravaj” lingvoj, kaj alta pago estas ofertata al dungotoj sciantaj la araban, farsan, urduan, paŝtuan, rusan, ĉinan, korean... Amerikanoj alte studintaj tiujn lingvojn ne abundas, kaj inter ili supozeble ne abundas personoj kiuj emus vendi sin al CIA, misfama pro torturado kaj sekretaj malliberejoj.

–TG

Profesoro Krause meritas gratulojn pro giganta vortaro

Estas malfrua vespero. Sur miaj genuoj kuŝas valora kaj grava vortaro de germana lingvisto, prof. d-ro Eriko Krause el Lepsiko. Regas kvazaŭ sankta silento, nur komputilo apenaŭ aŭdeble susuras. Mian kapon trakuradas miraj kaj admiraj pensoj. Jen estas al mi eble karese palpi prestiĝan verkon, kies valoron ankaŭ eksteruloj facile kun divina sinteno povas kompreni. Temas pri 1679-paĝa libro “Grosses Wörterbuch Deutsch-Esperanto”, kiun produktis konata eldonejo Helmut Buske Verlag en Hamburgo 2007.

Kiel laiko mi povas kaj kuraĝas esprimi pro tiu ĉi unika eldonaĵo mian ĝojon, admiron kaj eĉ raviĝon. Luj homoj per lupeo serĉis erarojn kaj mankojn en tiu ĉi kolosa kolekto kaj fekunda fonto. Germanlingvanoj plej efike kapblas navigacii en tiu ĉi vortoceano, tre vasta kaj nemezureble profunda. Tamen jam supraĵa foliumado kunportas utilajn trovaĵojn kaj por spertaj lingvouzantoj kaj ankaŭ por freŝaj, komencantaj lernantoj. Pura ĝojo pro la vortarista sukceso sekvas min fidele la tutan tempon en la familia laborkabineto dum mia librokonatiĝa esplorado.

Ekstera aspekto estas okulfrape trankvila kaj antaŭ ĉio legebla. Dukolumna paĝo efike subtenas ĉiuuĝajn vortĉasantojn. Admirindan kvanton da vortoj la aŭtoro sukcesis kolekti. Li kribris dum jardekoj el gazetoj kaj libroj esencajn esprimojn, ĉar li estas vera leksikografo laboranta profesie en la Universitato de Lepsiko kaj membranta en Akademio de Esperanto. Aperas



abunde interesaj kunmetaĵoj. La Granda Germana-Esperanta Vortaro estas modela verko de leksikografio. Erich-Dieter Krause laboris kiel unuopulo kaj ĝuste pro tio ni devas uzi la vorton grandioza pri la fina rezulto.

Siatempe William Auld en la sesdekaj jaroj kritikis kelkajn vortelektojn de prof. J. C. Wells, ĉar oni uzis en brita vortaro unu latinan vortdifinon “pudendum muliebrem”. Ie mi rimarkis, ke nun oni grumblis pro tute vana vorto “starante fiki”. Kompreneble

mi milde ridetis, ĉar Krause tamen menciis germane la originan esprimon “Im Stehen ficken”. Permesu al mi kiel amatora kaj laika recenzanto ĉi tiun etan flanksalton el la elektita vojo tute rekta kaj difinita.

Decas fine fragmente ripeti, kion prof. I. F. Bociort skribis: “En la jaro 2007 aperinta granda vortaro de prof. Krause ne estas simple “dika”, ĝi estas “monumenta”, inda je nia sincera admiro. La aŭtoro meritas nian tutan dankemon kaj respekton. Ni konsciu, ekzemple, ke la du-direktaj (Germana-Esperanto) leksikografiaj laboraĵoj de profesoro Krause postulis altan lingvistan kvalifikon, bonegan regadon de nia lingvo, ĉirkaŭ kvardekjaran laboron por kolekti kaj selekti centmilojn da slipoj el libroj, gazetoj kaj radioelsendoj, kiujn oni devis aranĝi laŭ tre klara kaj konsekvenca koncepto.” - - - Sincere kaj humile mi subskribas la vortojn de I. F. Bociort kaj varme ĉirkaŭbrakumas nian konatan lepsikan vortariston.

Jorma Ahomäki

Malferma Tago kun historiaj akcentoj

Anna Löwenstein, verkistino kaj membro de la Akademio de Esperanto, estis la ĉefpreleganto de la 30-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en aprilo. En prelegoj ŝi rememoris pri sia agado en UEA kaj parolis pri sia verkista aktivado, interalie sia nova historia romano "Morto de artisto".

Krome prelegis Juan Besada el Kubo pri la historio kaj nuntempaj apartaĵoj de la tiea Esperanto-movado, paro Johan kaj Svetlana Derks pri sia jarkomenca instrua aktivado en Afriko kaj pri interesa projekto realigota en Burundo, kaj Douwe Beerda el Nederlanda Esperanto-Junularo pri ties agado kaj retejo pri homaj rajtoj, www.homajrajtoj.org. Surpriza programero estis filmoj, unu farita en la unua Internacia Junulara Kongreso en la nederlanda vilaĝo Groet en 1938, kie estis fondita TEJO, kaj du filmitaj IJK en Gdansko kaj UK en Varsovio en 1959.

La Libroservo vendis varojn sume por 1307 eŭroj, plej multnombre: "La Asocio", artikolaro de Ziko van Dijk pri la historio de UEA, "Morto de artisto" de Anna Löwenstein, la gvidlibro por KER-ekzamenoj "Esperanto de nivelo al nivelo" kaj la UEA-historio "Utila Estas Aliĝo" de Ulrich Lins.

(el komunikado de UEA koncizigis mm)

UEA aktivas en ALTE

Petra Smidéliusz el Hungario, universitate kvalifikita specialisto pri testado de lingvokonaj kaj kunlaboranto de Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, reprezentis UEA en la 36-a konferenco de la Asocio de Lingvistoj en Eŭropo (ALTE), kiu okazis en Santiago de Compostela, Hispanio, de la 22-a ĝis la 24-a de aprilo. Akorde kun la celoj de la komisiono de UEA pri la ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referencokadro (KER), laŭ kiuj oni planas ella-

bori kaj akreditigi ĉe ALTE ekzamenistojn por infanoj-junuloj, Smidéliusz partoprenis en la laborgrupoj pri normigo de ekzamenoj por junaj gelnantoj (7-12 jaraĵoj).

La konferenco estis konsiderata ankaŭ lingvopolitike grava evento. Alparolis ĝin Leonard Orban, EU-komisionano pri multlingvismo, kiu emfazis, ke la lingvolernado de eŭropaj infanoj havas grandan gravecon kaj sekve tre gravas la evoluigo de iliaj lertecoj kaj kompetentoj.

(el komunikado de UEA koncizigis mm)

Clerici rezignis el estraro

Ranieri Clerici, vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio, anoncis en la kunsido de la Estraro la 29-an de marto sian decidon rezigni pro sanproblemoj pri estraraneco kun tuja ekvalido. La aliaj estraranoj akceptis la sciigon de sia kolego kun granda bedaŭro.

Krom funkcii kiel unu el la du vicprezidantoj, Clerici respondecis pri la eksteraj rilatoj de UEA. Ĉar dank' al la laboro de Clerici la eksteraj rilatoj de UEA disvolviĝas sur sufiĉe solida bazo, la Estraro ne proponas al la Komitato alekton de nova estrarano por la restanta mandatperiodo ĝis la UK 2010.

(el komunikado de UEA koncizigis mm)

UEA lanĉis retan filmĵurnalon

La 15-an de majo 1998 estis dissendita la unua numero de Gazetaraj Komunikadoj de UEA. Precize 11 jarojn poste la populara novaĵservo ricevis aŭdvidan kunulon, kiu nomiĝas "UEA viva". Temas pri 10-minuta filmĵurnalo en YouTube kun mallongaj raportetoj pri aktualaĵoj en la vivo de UEA kaj TEJO kaj de la Centra Oficejo: <http://www.youtube.com/UEAviva>

La lanĉo de la reta ĵurnalo "UEA viva" estas nova paŝo en la plivastiganta utiligo de moder-

naj komunikrimedoj en la agado de UEA, kiun antaŭvidis la Strategia Laborplano de la Asocio. Komence de majo UEA funkciigis retan kinemon en Ipernity, kie jam estas videblaj ok filmoj pri la programeroj de la aprila Malferma Tago kaj du historiaj dokumentoj pri la unua IJK en 1938 kaj pri IJK kaj UK en 1959: <http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video>

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

UN-aktivado de UEA en EsperantoTv

La aktivadon de la reprezentantoj de UEA ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo oni povas nun sekvi per la interreta televido EsperantoTv ĉe <http://www.youtube.com/EsperantoTv>

Oni klopodas aperigi la filmetojn, krom la originala alparollingvo, almenaŭ en du-tri alilingvaj versioj, nepre ankaŭ en Esperanto. Krome la tekstaj versioj estas elŝuteblaj de la retpaĝo

<http://www.lingvaj-raĵtoj.org/eventoj/>

(el komuniko de UEA prenis mm)

Eventokalendaro de EAF

2009

- 22.-26.6.2009 Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi kun posta ekskurso al Valamo de Ladogo
- 18.-25.7.2009 Internacia Junulara Kongreso, Liberec', Ĉeĥio
- 25.7.-1.8.2009 Universala Kongreso de Esperanto, Bjalistoko, Pollando
- 19.-20.9.2009 Aŭtunaj Tagoj en Pori
- Decembre aranĝoj lige al Zamenhofa tago

Laborkunsidoj

14.6.2009 Estraro

La programo de Antaŭen en la somero kaj aŭtuno 2009

La kafejaj renkontiĝoj en la ĉefbiblioteko Metso ĉiulunde je la 17-18 inter 25.5.–24.8. Gastiĝojigas nin, bonvenon!

Somera ekskurso sabate 6.6. al la aŭtomuzeo Mobilia kaj salikbieno Marjamäki en Kangasala. Ni kolektiĝos je la 10a surkorte de la benzinstacio ĉe la stratkruciĝo Teiskontie–Irjalankatu.

Du eksterlandaj gastoj vizitos Tampere: s-ino Taeko OSIOKA el Japanio 12.-14.7. kaj hungara s-ro István Móroc. Io komuna inter Antaŭen aranĝiĝos. Kontaktu Sylvia por pli precizaj scioj, se iu ne-antaŭenano volas kunesti.

La aŭtunaj kunvenoj kaj temoj:

- septembro 7.9. gasto István Móroc
- oktobro 5.10. someraj okazaĵoj
- novembro 2.11. lingvaj nuksoj, 16.11. elekta kunveno
- decembro 14.12. Zamenhof-vespero kaj juleto

La estraro kunvenos 24.8. je la 16a, 2.11. kaj 16.11. post la monatkunveno.

Kontaktpersono Sylvia Hämäläinen, sylvia.h@kolumbus.fi, 050 321 4313, (03) 346 3493

Esperanto-Societo en Turku – someraj renkontiĝoj

Ankaŭ dum la somera tempo niaj membroj vidos unu la alian merkrede proksimume inter 16.30 kaj 17.30 en la kafejo Sirius de la ĉefbiblioteko en Linnankatu 2. Renkontiĝoj okazas preskaŭ sen esceptoj, kaj gastoj estas ĉiam bonvenaj. Por certigi, ke vi vidos niajn membrojn, vi povos esti en kontakto kun la prezidanto aŭ vicprezidanto de EST (Tiina Oittinen, tel. 050 5494709 aŭ Anna-Liisa Ali-Simola, tel. 040 5541680).

Bonan someron al ĉiuj!

Estraro de EST

Aŭtunaj Tagoj en Pori

Syyspäivät Porissa 19.–20.9.2009

Marŝo de Pori-anoj – 200-jara Finnlando
Porilaisten marssi – Suomi 200 vuotta

Aŭtunaj Tagoj koncentriĝos al du gravaj jaroj en la pasinteco: La jaro 1859 estis grava por Esperanto, 1809 por Finnlando. De la unua pasis 150 jaroj kaj temas ja pri naskiĝjaro de L. L. Zamenhof. Kiel ni scias, ĉi-jare Esperantaj aranĝoj multflanke prezentas vivon de la fondinto. Finnlando estis antaŭ 200 jaroj, ĉe turnopunkto, kiu komencis la vojon al popollingva nacia emancipiĝo.

Pri tiuj du gravaj eventoj estos kolektita la programo en Pori/Björneborg kun erudicio kaj arto. Kontribuantoj el ĉiuj landoj kaj popoloj ĉirkaŭ la Balta maro estas petitaj veni por riĉigi la tagojn, kun podia diskuto, ekspoziciaĵoj, muzikaĵoj ktp. Unu preleganto venos el Hungario: S-ro István Mórocz, kiu aŭguste-septembre turneos en Finnlando.

Venu al Pori/Björneborg ankaŭ vi! Se vi deziras partopreni en la programo, bonvolu kontaktiĝi kun la prezidanto de EAF aŭ kun la lokaj aranĝantoj.

Kelkaj konkretaj detaloj pri la programo: La loko de la tagoj estos restoracio Liisanpuisto en la centro (adreso: Liisankatu 20, 28100 Pori). Sabate la 19-an de septembro la akceptejo funkcios ekde 11.30 kaj solena malfermo okazos je la 13-a. Antaŭ tio ni faros publikan prezentadon de Esperanto kaj donos gazetaran akcept-

on. Por tiuj kiuj alvenos frue, eblas memstara lunĉado en la urbo, pri konvenaj ejoj vi povos informiĝi ĉe lokaj aranĝantoj.


Ĉiuj programeroj, kafoj kaj manĝoj okazos en restoracio Liisanpuisto. Pri la tranoktado ĉiu partoprenanto zorgu mem. Ni povas rekomendi kelkajn lokojn, kiuj situas proksime de nia kunvenejo, vidu la liston.

Dimanĉe posttagmeze al la programo apartenas urba rondveturo en strata trajneto Poritar ("pori-anino") kun ĉefe esperantlingva ĉiĉeronado. La fermo de la tagoj estos ĉirkaŭ la dua kaj duono.

La detala programo aperos en sekva Esperantolehti kaj plejeble baldaŭ en niaj retpaĝoj: www.esperanto.fi kaj esperantopori.wikispaces.com.



Maŭzoleo de Juselius.



Syyspäivien aiheena on tänä vuonna kaksi tärkeää vuotta: 1859 on esperanton ja 1809 Suomen juhluvuosi. Ensin mainitusta on kulunut 150 vuotta: Se on esperanton kehittäjän L.L. Zamenhofin syntymävuosi, jota juhlistetaan kaikkialla esperantomailmassa. Suomi oli vuonna 1809 käännekohdassa: Silloin maa liitettiin kansakuntien joukkoon ja alkoi kansallinen herääminen.

Näistä kahdesta tärkeästä tapahtumasta kootaan Porin syyspäivien ohjelma tunteella, taidolla ja tiedolla. Olemme pyytäneet osallistujia niin ohjelman tekoon kuin yleisöksi Itämeren ympäristön maista ja kansoista osallistumaan päivien keskusteluihin, luentoihin, näyttelyihin, musiikkiin jne. Unkarista tulee luennoimaan Somerolla 1960-luvulla esperanton opettajana ollut István Mórocz, joka juuri sopivasti elossyyskuussa vieraillee Suomessa.

Tule sinäkin Poriin! Jos haluat osallistua ohjelmaan, ota yhteyttä Suomen Esperantoliiton

ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF
19.–20.9.2009 en Pori.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo:

14 e ĝis 15.8.2009 _____

18 e ĝis 5.9.2009 _____

21 e poste _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

AT-paketo

inkl. manĝojn en rest. Liisanpuisto (kafo kaj vespermanĝo sabate, tagmanĝo dimanĉe) _____ 50 e

Pri tranoktado bv. legi en la teksto.

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.

Bv. uzi la referencnumeron 4640.

Pliaj informoj aŭ deziroj _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

BONVENON!

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville
19.–20.9.2009 Porissa

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Ilmoittautumismaksu:

14 e 15.8.2009 saakka _____

18 e 5.9.2009 saakka _____

21 e 5.9.2009 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

AT-paketti

sis. ruokailut rav. Liisanpuistossa (kahvi ja illallinen lauantaina, lounas sunnuntaina) _____ 50 e

Majoitukset ks. teksti.

Maksut yhteensä Suomen

Esperantoliiton tilille _____

Tilinumero: Sampo 800017-230825.

Käytä viitenumeroa 4640 (ei muita tietoja maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto

Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse eafmendoj@esperanto.fi

TERVETULOA!

puheenjohtajaan tai paikallisiin järjestäjiin.

Käytännön yksityiskohtia: Tapahtumapaikana on ravintola Liisanpuisto keskustassa (osoite: Liisankatu 20, 28100 Pori). Vastaanotto aukeaa siellä lauantaina 19.9. klo 11.30 ja avajaiset ovat klo 13.00. Ennen sitä meillä on esperanton esittelytilaisuus suurelle yleisölle sekä lehdistötilaisuus. Ne, jotka tulevat Poriin jo lauantaiamuna, voivat omatoimisesti mennä yhteiselle lounaalle, porilaiset esperantistit auttavat sopivien paikkojen etsinnässä.

Kaikki ohjelmanumerot, kahvit ja ruokailut järjestetään ravintola Liisanpuistossa. Yöpymisen jokainen hoitaa itse. Katso listaa suositeltavista majoituspaikoista tekstin lopussa.

Sunnuntaina iltapäivällä pääsemme kiertojärelle kaupunkijuna Porittarella. Paikallinen matkailuopas on lupautunut opiskelemaan sen verran esperantoa, että ajelun opastukset sujuvat suoraan.

Päivien yksityiskohtainen ohjelma ilmestyy seuraavassa Esperantolehdessä ja mahdollisimman pian nettisivuillamme www.esperanto.fi ja esperantopori.wikispaces.com.

Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki, aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson eafmendoj@esperanto.fi. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron, kiu estas menciita en la aliĝilo. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke ni organizantoj scios, kiu volas kion dum la VT. Pri la aliĝiloj kaj pagoj pri-zorgas Paula Niinikorpi kaj Päivi Saarinen.

Kun eventualaj demandoj pri AT-aranĝoj, programo, tranoktoj, manĝoj, vojaĝeblecoj ktp. vi povas turni vin al lokaj aranĝantoj en Pori: Paula Niinikorpi (paula.niinikorpi@gmail.com, tel. 040-5274821) kaj Robert Bogenschneider (retadreso: robog@gmx.de, tel. 040-3524685).

Ankaŭ helpas vin EAF-prezidanto Tuomo Grundström, EAF-vicprezidanto Päivi Saarinen

kaj EAF-sekretario Tiina Oittinen, kies kontaktoinformoj estas sur paĝo 2.

Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittautuminen lähettämällä ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kertomalla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi. Maksa osallistumis- ja pakettimaksu ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot, jotta tiedämme, mitä olet tilannut ja milloin tulet. Ilmoittautumisista ja maksuista huolehtivat Paula Niinikorpi kaj Päivi Saarinen.

Lisätietoja talvipäivien ohjelmasta, majoituksesta, ruokailusta ja matkustusvaihtoehdoista voit kysellä Porin paikallisilta esperantisteilta Paula Niinikorvelta (paula.niinikorpi@gmail.com, puh. 040-5274821) ja Robert Bogenschneiderilta (robog@gmx.de, tel. 040-3524685). Myös liiton puheenjohtaja Tuomo Grundström, varapuheenjohtaja Päivi Saarisena ja sihteeri Tiina Oittinen vastaavat syyspäiviin liittyviin kysymyksiin, heidän yhteystiedonsa ovat lehden sivulla 2.



Restoracio Liisanpuisto.

Eblaj tranoktejoj en Pori – Majoitusmahdollisuuksia Porissa

Hostel Buisto, Itäpuisto 13, 28100 Pori, puh: 044-3330646, www.hostelbuisto.net (vaatimaton, edullinen; favorpreza, modesta. 600 m kokouspaikasta/de kunvenejo)

Sokos Hotel Vaakuna, Gallen-Kallelankatu 7, 28100 Pori, puh: 0201234626, www.sokoshotels.fi/hotellit/pori/ (hyvätasoinen, ydinkeskustassa 600 m kokouspaikasta/luksa, 600 metrojn de kunvenejo en la urbocentro)

Hotelli Cumulus, Yrjönkatu 24, 28100 Pori, puh: (02) 550900, www.cumulus.fi/hotellit/pori/fi_FL/pori/ (Vaakunaa edullisempi, noin 800 m kokouspaikasta linja-autoaseman lähellä/pli favorpreza ol Sokos Vaakuna, ĉ. 800 metrojn de kunvenejo, proksime de la busstacidomo)



Strata trajneto "Poritar".

*Tervetuloa – Bonvenon!
Estraro de EAF kaj Porianoj*

*Fotoj:
Robert Bogenschneider*

Estraro de EAF decidis

en kunsido 18.4. interalie inviti reprezentantojn de ĉiuj ĉe-Baltmaraj E-organizaĵoj partopreni kaj kontribui en la temo de la Aŭtunaj Tagoj en Pori. Rekompencon de ĉiuj elspezoj la asocio tamen ne povas promesi. Estis aprobitaj organizaĵaj kaj financaj detaloj, kiujn vi trovas en la AT-informo kaj -aliĝilo en ĉi tiu gazetnumero.

Estis akceptita longa listo de komisiitoj por diversaj agadoj de la asocio; ĝi estas trovebla en la interreta hejmpaĝo de la asocio. Kiel la estraro konstatis, la listo "vivas", kompletiga ankaŭ dum la jaro – novaj aktivuloj por helpi en praktikaj aferoj ĉiam estas bonvenaj.

Estis decidite sendi Esperantolehti al bibliotekoj de la lokoj de Vintraj kaj Aŭtunaj tagoj dum koncerna jaro. Pri la gazetaj financoj estis notite, ke peto de subteno estis sendita kaj akceptita ĉe la edukministerio. Por pasinta jaro ni ne ricevis, malkiel dum multaj jaroj. La ministerio malaltigis la tutan sumon disdonatan.

Pri la tradicia kurso en Valamo oni sciis, ke certe efektiviĝos kun jam dek partoprenantoj. (Ĝis apero de ĉi tiu EF aliĝis dek pliaj – la kurso fariĝas amaseto!) EAF peras pagojn.

Kunlaboro de ELFI daŭras kun la korespon-

da kursejoj de popolaltlernejo Oriveden Opisto; Sylvia Hämäläinen okupiĝas pri nova lernomaterialo kaj akceptas la taskon de kontrolanto.

La asocio pagas la elspezojn de la loko de FEJO en festivalo Maailma kylässä 23.–24.5. en Helsinki. – Estis informita la nuligo de la Italuja paska junularfestivalo, por kiu FEJO ricevis du stipendiojn de la edukministerio.

La asocio partoprenos en Movada Foiro en la UK kun reklamo kaj varbado por interalie Aŭtunaj tagoj. Okaze de la jubilea Zamenhof-jaro la estraro instigas ĉiujn lokajn klubojn kaj agantojn aranĝi eventojn kaj ekspoziciojn, kampanjojn ĉe amaskomunikiloj, kaj liveras materialojn por tio. Unu taŭga materialo estas la dvd-disko "Esperanto estas", finnlingva, kies ekzempleron la asocio sendas al ĉiu membroasocio, kaj vendas pliajn por po 5 eŭroj.

Estis akceptita interkonsento pri la uzo de la oficejo por loĝigi gastojn kontraŭ pago de kaj la asocio kaj la Helsinki-klubo. La oficejo estas en bona stato, kaj por tion teni, enspezoj bonvenas.

(tg)

Esperantokurso en Valamo – la 10-an fojon somere 2009

Al la Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi aliĝis ĉi-jare dudeko de partoprenantoj. La kursanoj venos krom el Finnlando, ankaŭ el Rusio kaj Hispanio. La instruado okazos en tri grupoj: en elementa grupo (3-5 kursanoj) kaj du daŭrigantaj grupoj (po 6-8 kursanoj), en kiuj oni diskutas kaj profundigas sian lingvoscion. La instruistoj estos samaj kiel lastjare: Atilio Orellana Rojas kaj Patrik Austin kun helpo de Tiina Oittinen, kiu ankaŭ agas kiel kursospondeculo. Dum la libertempaj aranĝoj ĉiuj kursanoj estos kune ekskursante, ludante kaj festante. Jukka Laaksonen denove ĉiĉero-

nos esperante.

Post la kurso okazos laŭplane la ekskursiva vojaĝo al malnova Valamo de Ladogo. La sep esperantistaj partoprenantoj povis aliĝi en vojaĝo aranĝita de vojaĝagentejo el Joensuu kaj vojaĝos en grupo de tridek finnoj.

Pri la kurso vi certe povos legi pli en la venontaj numeroj de Esperantolehti. Ni esperas havi same multflankan, interesan kaj memorplenan semajnon kiel dum ĉiuj antaŭaj kursoj.

*Atendante la kursanojn
Atilio, Patrik kaj Tiina*

Stanislawa Mehtonen 1928-2009

S-ino Stanislawa Mehtonen (Nowak) forpasis 7.5.2009 en Oulu. Ŝi naskiĝis 5.1.1928 en Lodz (Pollando). Stanislawa lernis Esperanton en sia hejmurbo antaŭ UK de Varsovio 1959.

Dum la la kongreso ŝi renkontis finnan esperantiston, Allan Mehtonen. Ili enamiĝis. Poste juna polino veturis al Finnlando, en kiu ili geedziĝis. Al ili naskiĝis du infanoj, Eeva kaj Paavo, kiuj estas denaskaj esperantistoj.

Stanislawa ege ŝatis Finnlandon, sed ŝi ne forĝesis sian hejmlandon aŭskultante elsendojn de Pola Radio kaj regule telefonante al sia fratino. S-ino Mehtonen kune kun sia edzo partoprenis al okazaĵoj esperantaj kaj ŝi havis multe da amikoj en Esperantujo. Dum jardekoj S-ino Stanislawa Mehtonen estis aktiva estraranino de Esperanto-societo de Oulu.

Ni, oulu-anaj esperantistoj, kondolencas familion Mehtonen pro forpaso de via kara Stanislawa.

Oulun Esperantoseuran perustajajäsen ja pitkäaikainen johtokunnan jäsen Stanislawa Mehtonen (s. Nowak) nukkui pois lyhyen sairauden murtamana 7.5.2009 Oulussa. Stanislawa syntyi 5.1.1928 Lodzissa Puolassa. Hän opiskeli esperantoa 1950-luvun loppupuolella kotikaupungissaan. Varsovan kansainvälisestä Esperantokongressista 1959 tuli hänen elämänsä käännekohta.

Kongressissa Stanislawa tapasi oululaisen esperantistin Allan Mehtosen. Siitä alkoi kaunis rakkaustarina. Stanislawa muutti Suomeen 1960 ja meni naimisiin Allansinsa kanssa. Perheeseen syntyi kaksi lasta, Eeva ja Paavo, joista tuli "syntyperäisiä" esperantisteja, olihan Mehtosten kotikielenä esperanto. Vaikka Suomesta tuli Stanislawan rakastama uusi kotimaa, hän piti säännöllisesti yhteyttä synnyinmaahansa ja siellä asuvaan sisarensa aina sisaren kuolemaan saakka. Vuosikymmenten ajan Stanislawa oli tuttu näky esperantotapahtumissa miehensä Allansin kanssa.

Stanislawan luonnetta kuvaillevat parhaiten sanat hillitty ja seurallinen. Hänen elämänasenteensa pysyi valoisa loppuun saakka. Meille oululaisille esperantisteille hän oli myös "omanatuntoona". Jos tapaamisissamme lipsahdimme puhumaan suomea, sormet napsahtelivat pöytää vasten ja kuului ystävällisesti esiintuotu huomautus: "parolu Esperanton", puhukaa esperantoa.

Me oululaiset esperantistit esitämme surunvalittelumme lähiomaisille.

Erkki Röntynen ▷



(Fotis Saliko en Touraine, Francio)

Rememoroj pri Stanislawa Mehtonen

Somero 1968 estis decida al vekigo kaj formigo de tiam dekkvinjara junulo. Memlerninte la elementojn de esperanto, trovinte literaturon, gazeton kaj radion, mi komencis la someron per mia unua memstara kaj ĝis tiam plej longa vojaĝo. Tiu estis al Sundsvall en Svedio, kaj tiu estis mia unua parola kontakto en Esperantujo. Dum la somero mi ekkonis en mia hejmurbo Rauma Onni Harpio, aktivulon ekde dudekaj jaroj. Fine de la somero mi havis la ŝancon al eĉ pli longa vojaĝo, ĝis la nordfinlanda urbo Oulu por familia komiso.

Jam UEA-membro, mi skribis al la delegito kaj proponis renkontigon por konatiĝi. La delegito estis Allan Mehtonen. Li respondis kun afabla invito viziti lin kaj la familion hejme. Mi eksciis ke la familio estas esperanta, la edzino el Pollando, du gefiloj malgrandaj. Mi sentis ioman necertecon. Ĉu mi scias min kondukti? Fakte mi ne scias. Akompanis min filino de mia mastra familio, kiu konsilis vojon kaj atentigis kunporti florojn, kion la plumpa knabeto ne sciintus pripensi. Bonŝance, ĉar Stanislawa Mehtonen estis la unua en Esperantujo, al kiu mi donis florojn.

Mi estis amike akceptita de simpatia familio tiam juna – la geedzoj sin ekkonis naŭ jarojn antaŭe en la jubilea kongreso en Varsovio. Sed mi estis tiom juna, ke min impresis ilia natureca kaj senpera rilatado – plenkreskaj, seriozaj homoj parolis kun mi kiel kun samrangulo! Tion ĝis tiam mi malofte spertis. Ankaŭ Eeva kaj Paavo senĝene parolis – ja esperante – kaj la knabego intergeneracia sin eksentis libere.

Oni diskutis pri lingvo, movado, Zamenhof kaj liaj idealoj, kaj pri ĉiutagaĵoj, laboro kaj lernado. Sed oni diskutis ankaŭ pri la mondo kaj tiu monda realeco, kiu diametre kontraŭdiras la internaciismajn aspirojn. Estis somerfino. Alveturinte la 22-an de aŭgusto mi vidis en la

fervoja stacio de Oulu rubrikegojn de ĵurnaloj. Ĉeĥoslovakio estis okupita de "internaciismo". Mia scio pri la mondo kaj historio tiam estis modesta. Stanislawa malmulte parolis, sed multe komprenigis. Mondaj eventoj de printempo kaj de aŭtuno, kaj Esperantujaj spertoj de somero en 1968 orientis la adoleskulon serĉi veron.

En postaj jaroj ni renkontiĝis malofte, kaj ĉiam tiuj renkontiĝoj estis korsimpatiaj. Ni estis sur sama ondolongo, kiel Allan foje diris. En lastaj jaroj ŝia vivo estis fizike-move limigita, sed spirite vigla. Kiam ni lastan fojon renkontiĝis antaŭ kelkaj jaroj kaj la geedzoj rememoris sian historion, mi pensis pri la romanoj esperante verkitaj: Nur parteto el ili estas verkitaj kaj presitaj sur papero, plej multaj estas vivitaj, kaj jen eble la plej bela el ili.

Unuaj Esperantujaj floroj al ŝi. Nun estas donitaj ŝiaj lastaj surteraj floroj, sed tuta ĝardeno de ŝi plantita restas ĉe Allan, Eeva kaj Paavo, kaj la esperanta amikaro.

Tuomo Grundström, prezidanto de EAF

Aristids Medins 1944–2009

Kun granda malĝojo en la koro mi anoncas, ke la 2-an de aprilo post longa kaj malfacila malsano en Rigo forpasis estrarano de Latvia Esperanto-Asocio, konata latva esperantisto Aristids Medins (nask.31.08.1944).

A. Medins estis longjara aktivulo de Latvia Esperanto-movado, organizis multajn Esperanto-aranĝojn, inter ili ankaŭ popularan printempan renkontigon "Neĝfloketo", gvidis Esperanto-klubon "Radieto", okupiĝis pli eldonado de Esperanto-libroj, glumarkoj, insignoj k.a., estis membro de redakcia komisiono de "Latvia Esperantisto". Ekde 1989, kiam Latvia Esperanto-Asocio aliĝis al UEA, li estis individua membro de UEA, delegito por Rigo.

*Margarita Zelve
prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio*

Kio aŭ kiu nin limigas

Estas opinioj, ke nin limigas objektivaj mankoj: manko de libera tempo, manko de mono, manko de kondiĉoj kaj tiel plu. Estas ankaŭ opinioj, ke nin limigas subjektivaj limigoj kaj inter ili, ekzemple, malkoincidaj kun la niaj interesoj de ceteraj homoj. Sendube ambaŭ tiuj grupoj de la limigoj estas tute naturaj.

Tamen estas ankoraŭ unu grupo de limigoj, kiu dependas de ni mem. Temas pri nia rekompenso pago al niaj aktivuloj pro ties aktiveco. Ne temas pri gloro, kiun la aktivuloj ricevas sufiĉe. Temas pri nia diskut- kaj voĉrajto. Ni devas konsenti tion, ke ili rajtas esti niaj paŝtistoj, sed ne nepre la plej bonaj el tiuj, ĉar ni eĉ havas neniun rajton simple fariĝi aŭditaj. Kaj nome mia sperto pri tio iniciatigas min proponi publikan preparolon de la problemo.

Laŭ mia opinio dume ne venis tempo por radikale uzi la rimedojn de Finnlanda oficiala reguligo de la problemo, laŭ kiu regule okazas rotacio kaj renovigo de administraro. Ni ja vi-

das, ke niaj aktivuloj en nesufiĉe bonaj kondiĉoj lertas fari sufiĉe multon kaj zorgas pri almenaŭ formalaj principoj de demokratieco. Tamen mi opinias, ke nun jam venis tempo aperigi en kadre de EAF specialan komitaton, kiu okupiĝus pri analitika kaj metodika laboro. Centra tasko de la komitato povus esti pristudo de la sperto kaj disvastigo inter kluba gvidantaro modernajn principojn, kiuj helpus solvi iliajn aktualajn problemojn.

Por la propono estu senerare komprenata, mi uzu vortojn de unu fama gvidanto:

“Mi opinias, ke mia la plej valora kvalito estas mia kapablo aperigi ĉe la homo entuziasmon kaj evoluigi ĉe li ĉion, kio estas la plej bona, helpe de agnosko de lia digno kaj pere de aprobo de la agoj”. Estus bone, ke gvidantoj de la Movado sekvus tiun ĉi principon.

(la skribanto volas resti anonima)


Elegio

*Naĝanto naĝas sole, grandega oceano disvastiĝas ĉirkaŭ li.
La destinon li ne vidas, li ne eĉ scias la korektan direkton.
Lia sola espero estas vidi verdan bordon antaŭ li
aŭ renkonti baldaŭ la ŝipon de savantoj.*

*La piedoj sensentiĝas, laciĝas la brakoj, l'espero elvaporigigas,
sed jen alvenas velo trans la akvo.
Kiam la ŝalupo pli proksime venas,
povas la naĝanto vidi sur ĝia ferdeko
siajn terurajn pekojn stari kaj al li rikani.*

*“Pardonu min”, li krias en lia mizerego,
“mi ne ankoraŭ estas preta renkonti mian morton.”
Sed kun nigraj kaj glaciaj okuloj ili fiksrigardas lin
kaj levante sian mezan fingron malaperas for.*

Seppo Mussalo



www.sxc.hu

Labormendo per Rondo Kato

La ĉefredaktoro skribis pri komercaj aferoj en Esperantujo, celante tion, ke ankaŭ tiu branĉo devus komenci elkreski en nia multbranĉa esperanta kaj interesa arbo. – Nu bone! – Mi kiel negocista filo, mem estinta bazaristo 1965–70 kaj iniciinto de (nune) Rondo "Kato" – Esperantista Kat-Amikaro, kaj tiel iom spertinta en multaj formoj komercaĵojn – ankaŭ iomete per Esperanto – volas nun iomete rakonti pri iuj spertoj (estus tro por la gazetaj paĝoj rakonti ĉiujn).

Estinte bazaristo, mi konatiĝis kun tampereana hobia kaj besta komercisto Pekka Lehtinen, de lia butikio mi ricevis dufoje por la majtagoj majtagajn vendaĵojn. De la nevenditaj, li ne fakturis. Sen Esperanto la afero ne estus okazinta.

Pli komplika estis pli poste grandforma karkarta menda afero en Britio, kiu origine devis veni al Finnlando. Nu la afero okazis proksimume ĉi tiel: Mi estis sendinta grandforman katemman karton al nia prezidantino Marjorie Boulton, kaj ŝi montrinta ĝin al sia amikino, kiu estis paperajkomercistino. Ŝi volis ricevi pli da tiaj al sia butikio. Sekvis la mendo al la desegnistino Lisitzin en Finnlando. Mi peris la mendon tradukante ĝin – sed ŝi ne kredis ĝin la vera! Nu, la paperajvendistino devis ricevi la interesajn katkartojn serie por sia vendejo. Pro la malfruigo mi peris la mendon al kimra desegnistino en Kimrujo, kiu plenigis la katserian mendon. – Sekve la mendo per Finnlando en Britio al Britio!! Dankon al Esperanto!

Sekve mi vidas la esperantajjn eblecojn disvastigi nian agkampon nur de precipe la ideala ankaŭ al la komerca plej facile nur tiel, ke ni komencu de niaj kampoj en tiaj, kie estus ankaŭ materiaj kaj servaj ageblecoj plej facile. La organizaĵo Rondo "Kato" – Esperantista Kat-Amikaro estas unu el la plej naturaj, ĉar mi spertis nekonvenajn spertojn ekster nia agadkampo alie. Nu, mi rakontu iom: ekz. unu germana firmao volis serĉi en Finnlando al sia



filtrila vendado reprezentiston. Mi ricevis la dokumentojn en la germana kaj Esperanto. Tio okazis dum la granda senlaboreco komence de la 90-aj jaroj. Tiujn serĉpaperojn mi portis al la loka laborforta oficejo rimarkinte pri la laborebleco. – Nu, kion faris la laborforta oficejo? Vizitante tie sekvafoje, mi demandis pri la afero por kio la oficejoj eĉ havas la gazeton. La oficistino diris: "Nu, la afero estis tiel stranga." Sekve ili estis farintaj nenion, kvankam la dokumenta afero estis legebla dulingve, kaj mi klarigis per la esperanta teksto.

Same faris lignokonstrua firmao, kiu ne akceptis eblecon sendi la lignajn specimenapecajn bezonojn pri siaj diversaj lignokonstruaĵoj al Francio por la franca firmao, kiu volis kontakti la finnajn firmaojn – mi nenion postulis mone, mi nur volis helpi por la kontakta eblo... Nu, kion oni pensu? Oni devas unue esti tre speciala, due verŝajne la aferon oni devus prezenti angle – alie estas strange, kiel diris la laborforta oficistino! La angla ĉirkaŭmuro estas jam tiom forta, ke la esperanta komercado devus komenci inter ni mem. Mi rekomendas ekz. pri la kataj bezonaĵoj. Nuntempaj hejmkatoj bezonas la tre diversaĵojn. Ni produktu kaj vendu ilin disvastigante nian komercon al aliaj bestbezonaĵoj. Ia apogo estus jam la organizaĵo Rondo "Kato" kun sia gazeto. Same nature en la aliaj organizaĵoj, kiuj povus esti la semoj ankaŭ al la ekonomiaj agadoj en kaj el siaj startpunktoj.

Pentti Törmälä, Hamari

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon:

Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@welho.com.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☎ onni.kauppinen@pp.inet.fi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 ☎ www.esperanto.fi/jyvaskyla
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kallioaamankatu 10, 15150 Lahti. ☎ martti.pennanen@phnet.fi
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Olli Pajula), Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. ☎ <http://esperantooulu.info/> olli.pajula@gmail.com
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☎ matti.wallius@ebaana.net
- Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ☎ tapani.aarne@mbnet.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimi-to. ☎ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 445023-283606
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☎ steleto@pp.inet.fi
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta. Aktiivisia harrastajia on mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna

aperas dum la jaro

2009

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
4	10.7.	15.7.	5.8.
5	10.9.	15.9.	5.10.
6	10.11.	15.11.	5.12.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro: Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 e 1/1 sivu/paĝo 50 e

1/2 sivua/paĝo 60 e 1/2 sivua/paĝo 30 e

1/4 sivua/paĝo 40 e 1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo:

eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la

oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



En lasta decembro disvastiĝis ankaŭ jena novaĵo:



Kara mondcivitano,

La Sennacia Banko fieras anonci la lanĉon de sia nova monunujo: Mono.

Veras ke estas "nur" artprojekto ĝis nun, sed kial ne kredi ke iun tagon la mondo uzos nur unu monunuon?

La nuntempa valutmerkato kaŭzas grandan maljustecon en la mondo. Kial bovlo da supo devus kosti \$0,10 en iu loko kaj \$10 en alia. Tio estas preter kompreno por la plejmulto da mortontoj. Kaj ĉu interŝanĝi monon ne estas malpraktika kiam oni vojaĝas?

Mono ne dependas de iu ŝtato aŭ iu specifa geografia teritorio. Estas monda mono, kiu

antaŭenigos internacian komercon kaj samtempe reduktos malegalecon inter landoj. Baldaŭ, kiam la homoj konscios la avantaĝojn, vi povos uzi ĝin ĉie en la mondo.

La desegnaĵo de la monbiletojn enhavas portreton de Zamenhof sur la antaŭa flanko, kaj helikon sur la malantaŭa. La devizo "Unu Mondo, Unu Lingvo, Unu Mono" aperas en la fono. Kaj pro tio ke malebligi falsadon estas ĉefa prioritato por la Sennacia Banko, la monbiletoj enhavos sekuraĵojn kiel specialan kotonan paperon kun koloraj UV-fibroj nur videblaj per UV-lampo, filigranon kaj numerojn. La hodiaŭa kurzo estas ¥1000 po monbileto (enojn ĉar mi estas en Japanio nuntempe). Se vi aĉetas dek, la afranko estas senpaga.

Ĉu vi interesiĝas? Bonvolu mendi la monbiletojn rete, mi sendus PayPal-an fakturon. Eble vi povas kuniĝi kun amikoj por ŝpari la afrankon. Aŭ eble vi volus vendi la monbiletojn en esperanta kuniĝo aŭ kongreso, ĉiukaze vi gajnos procentaĵon.

*Daniel Salomon
Direktoro de la Sennacia Banko
www.heliko.org*

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy elokuussa. Jutut 15.7.2009 mennessä päätoimittajalle. La venonta numero aperos en aŭgusto. Artikoloj ĝis 15.7.2009 al la ĉefredaktoro. Osoite/adreso: Mikko Mäkitalo, Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku, puh/tel. (02) 2373 848, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

Kopio Niini/Cityoffset, Tampere 2009